


CERBE kaj KORE



**KULTURA SUPLEMENTO
AL BULTENO DE RUSIA ESPERANTISTA UNIO N-RO 101**

N-RO 6 (74), FEBRUARO 2019

Enhavo

Originala poezio

Klara Ilutoviĉ. Ĉe bildoj de Frida Kahlo 3

Valentin Melnikov Liberikoj 4

Jubilee. Tradukita poezio

Ivan Krilov. Okaze de 250-jariĝo.

“Elefanto kaj Mopseto” en tradukoj de Ludmila Novikova kaj Sergej Rublov 4

“Korniko kaj vulpo” en tradukoj de Ludmila Novikova kaj Sergej Rublov 6

Julia Drunina/ Okaze de 95-jariĝo.

Tri poemoj en traduko de Klara Ilutoviĉ 8

Tradukita prozo

Varlam Ŝalamov. Esperanto. Traduko de Mikaelo Povorin 9

Tradukita poezio

Du rusaj popolaj kantoj. Tradukis Gennadij Ŝlepĉenko 14

Prozo

Aleksej Nistratov. La hundaj sonĝoj 16

Kanto

“La timo de poet” Libera esperantigo de la ideo de Mark Melamed kaj muziko de


Mikaelo Povorin 18

Kultura projekto

Rusaj popolaj kantoj de la 20-a jarcento 20

Ĉe bildoj de Frida Kahlo


Klara Ilutoviĉ



Por ŝi la vivo estis kara.
Ŝi volis vivi sen ĝemvei
Kaj ĉe la sorto malavara
Je l' tragedioj sciis krei.


Ama sufer', malsanegado...
La viv elprovis ŝin kruise.
Kiel ne rompis ŝin invade
De l' malfeliĉ esperdegele?!

Simboloj-signoj grave rolas
Realo, sonĝo kaj imago
Korskue en la bildoj bolas
Je l' vivkurad', esper' kaj plago.



Eŭrop' kaj Meksikio kune
Inter cidaĵoj de l' naturo
Prezentas sen aŭ hele-sune,
Aŭ en abismoj de l' teruro.

Kuraĝe, vake, vivadmire
Tra la malice efektivo
Sonoras ĉiu bild' inspire:
“¡Viva la vida!” – “¡Vivo l'vivo!”



Liberikoj

(liberaj limerikoj)

Valentin Melnikov



La poeto de l' skolo Ibera
ĉiam verkis laŭ stilo libera.
“Ĉu ĝi estas poem’?” –
“Mi ne scias eĉ mem!” –
li respondis per vorto sincera.

Laŭ dir’ de hispanoj, Cervante-
-s, sen dub’, pli talentis ol Dante.
Italoj oponas,
ke Dante pli bonas,
nur vante la tempon perdante.

Verkist’ fama – Jonathan Swift –
neniam veturis per lift’.
Kaj same Ŝekspir’ –
laŭ onidir’.

Por moderna poeto Honkonga
Limerik’ ĉiam ŝajnis tro longa...



Presita antaŭe en Literatura Foiro 263; unua premio de EKRA-2013

Jubilee. Tradukita poezio


Ivan Krilov (1769 – 1844)

**La 13-an de februaro plenumiĝas
250 jaroj post la naskiĝo de la verkisto**



И. Крылов. Слон и Моська	I. Krilov. Elefanto kaj Mopseto	I. Krilov. Elefanto kaj Mopso
По улицам Слона водили, Как видно, на показ – Известно, что Слоны в диковинках у нас – Так за Слоном толпы	Gvidata estis Elefanto Laŭ stratoj por montrad’ – Ĉi best’ bizara estas ja por nia land’ – Do, sekvis gapular’ post demonstranto.	Lau stratoj Elefanto pasis Por montro al publik’. En nia norda land’ ghi estas ja unik’, — Do post la best’ gapuloj

<p>зевак ходили. Отколе ни возьмись, навстречу Моська им. Увидевши Слона, ну на него метаться, И лаять, и визжать, и рваться, Ну, так и лезет в драку с ним. – Соседка, перестань срамиться, Ей шавка говорит, – тебе ль с Слоном возиться? Смотри, уж ты хрипишь, а он себе идёт Вперёд, И лаю твоего совсем не примечает. – Эх, эх! – ей Моська отвечает – Вот то-то мне и духу придаёт, Что я совсем без драки Могу попасть в большие забияки. Пускай же говорят собаки: «Ай, Моська! Знать, она сильна, Что лаёт на Слона!»</p>	<p>Subite jen Mopset' aperis sur la strat'. Ĉe vid' de Elefant' ĝi tuj ekfuriozas, Bojadas, jelpas, agrespozas, Nu, strebas al interbatad'. – Najbaro, ĉesu kur-rekuri ! Ĉu vere povas vi kun Elefant' konkuri ? – Aldiras ŝpic' . – Vi raŭkas jam, sed Elefant' Sen halt' Avancas sen rimarki vian bravan dancon. – Ho he! Sed tio donas ŝancon, – Mopset respondas, – ke sen batalad' Mi iĝos populara Kiel atakemulo temerara. Kaj tiam diru hunda aro: “Aĥ, Mopso! Ŝajne veras fakt' – Ĝi fortas pli ol Elefant' !”</p> <p><i>Traduko de Ludmila Novikova (2014)</i></p>	<p>plen-amasis. Subite iu Mops' aperis en la strat', — Kaj al giganta best' sin jetis kun aŭdaco. Jen bojas, saltas ĝi sen laco Kaj pretas jam al batalad'. "Amiko, estu vi prudenta," Ŝaf-hund' avertas nun: "Ĝi estas evidenta, — La best' superas vin. Vi raŭkas pro koler', Sed ĝi en ver', La bojon en la strat' tutplene ne atentas." "He, he! Pri tio mi kontentas." Respondas Mopso kun fier': "Ja sen batig' efekta Famiĝos mi je batemul' perfekta. Do diru hundoj kun respekto: Plejfortas Mopso, sen demand', — Ĝi bojas kontraŭ Elefant'!"</p> <p><i>Traduko de Sergej Rublov</i></p>
---	--	--



И.Крылов. Ворона и Лисица	I.Krilov. Korniko kaj Vulpo	I.Krilov. Korniko kaj Vulpo
<p>Уж сколько раз твердили миру, Что лесь гнусна, вредна, но только всё не впрок, И в сердце льстец всегда отыщет уголок.</p> <p>Вороне где-то Бог послал кусочек сыру; На ель Ворона взгромоздьясь, Позавтракать было совсем уж собралась, Да призадумалась, а сыр во рту держала. На ту беду Лиса близёхонько бежала, Вдруг сырный дух Лису остановил: Лисица видит сыр, Лисицу сыр пленил. Плутовка к дереву на цыпочках подходит, Вертит хвостом, с Вороны глаз не сводит И говорит так сладко, чуть дыша: «Голубушка, как хороша! Ну, что за шейка, что за глазки! Рассказывать, так право, сказки! Какие пёрышки, какой носок! И, верно, ангельский быть должен голосок! Спой, светик, не стыдись! Что, ежели, сестрица, При красоте такой и петь ты мастерица, Верь, ты б у нас была б царь-птица!»</p>	<p>Kiom da fojoj oni diris, Ke flat' hontindas, sed rezulto estas nul', Kaj ĉiam trovas lokon en la kor' flatul'.</p> <hr/> <p>Jen Dio sendis al Korniko fromaĝeron; La bird' sur branĉo de la pin' Intencis uzi por la matenmanĝo ĝin, Sed ekmeditis kun la fromaĝer' en beko. Fatale Vulpo preterkuris por la peko, Fromaĝodoron Vulpo ekatentas, Fromaĝon vidas Vulp', la fromaĝero tentas. Jen la kanajlo piedpinte iras, Rigardturninte al Korniko, diras Mildvoĉe kaj spirbremse pro envi' : "Korninjo, kiel belas vi ! Jen kia kol", kiaj okuloj ! Ignoras ilin nur blinduloj ! Kiaj plumetoj estas, kia vost' ! Kaj plejverŝajne estas anĝeleca voĉ' ! Ekkantu, belulin' ! Se estas vi, fratino, Kun via belo ankaŭ por kantad' majstrino, Vi estus, kreu, bird'- carino!" Eksonis en la kropo de Kornik' stertor', La kapon turnis la kajola</p>	<p>Multfoje oni diras kun logiko Pri malutil' de flat' kaj tamen sen sukces', Char flato al la kor' penetras per kares'.</p> <p>Peceton da fromaĝ' ekhavis la Korniko. Jen sur abio, sur la branĉ', Korniko-nigrulin' intencis per la manĝ' Regali sin, sed dume ŝi meditis. Hazarde ruza Vulp' proksime preterglitis; Aromo de fromaĝh' impresas al la Vulp': Alvenas arbon li kun vido de senkulp'; Ravita de vidaj' la Vulpo voston svingas, Fromaĝon en la bek' agrable li distingas Kaj diras dolĉe li kun intermita spir': "Ho, mia karulin'! Belega por admir'! Mirindas via kol'! Okula bril' — juvelo! Gracia estas vi, simila al fabelo! Kaj kia plum-ornam'! Kaj kia charma buŝ'! Kaj certe via voĉ' plenravas en kortuŝ'! Ekkantu, karulin'! Se majstrus vi, fratino, Kantadon, kie vi belegas laŭ destino, Vi estus en arbar' reĝino!" La kapo de Kornik' turniĝis pro laŭdeg', Pro ĝojo en la Brust'</p>

<p>Вещунина с похвал вскружилась голова, От радости в зобу дыханье спёрло. И на приветливы лисицыны слова Ворона каркнула во всё воронье горло. Сыр выпал – с ним была плутовка такова.</p>	<p>vorto. Responde l' flaton de l' fripona Vulp'-retor' Grakegis jen Kornik' per tuta gorĝa forto. Elfalis la fromaĝ' – kaj Vulp' kun ĝi tuj for!</p> <p><i>Traduko de Ludmila Novikova (2014)</i></p>	<p>ekĉesis tute spiro, Kaj al ĝentila vort' de vulpa flata diro Ekgrakis la Kornik' kun malfermita bek', Fromaĝo falis for, al Vulpo — bel-akiro.</p> <p><i>Traduko de Sergej Rublov</i></p>
---	--	--



Julia Drunina (1924-1991) Okaze de 95-jariĝo post naskiĝo



Полжизни мы теряем из-за спешки.
Спеша, не замечаем мы подчас
Ни лужицы на шляпке сыроежки,
Ни боли в глубине любимых глаз...

И лишь, как говорится, на закате,
Средь суеты, в плену успеха, вдруг,
Тебя безжалостно за горло схватит
Холодными ручищами испуг.

Жил на бегу, за призраком в погоне,
В сетях забот и неотложных дел...
А может главное — и проворонил...
А может главное — и проглядел...

Минуты

Эко дело! Всего на минуту
Стало больше короткого дня.
Эка разница!.. Но почему-то
Посветлело в душе у меня.

Знаю, Силы зимы не иссякли,
И еще за морями грачи.
Ну, а все же минуты, что капли,
Станут снежные доты точить.

И грачи Устремятся в дорогу,
И ручьи В наступленье пойдут...
Эх, минута! И мало, и много:
Вся-то жизнь Состоит из минут.

1970

Неужто для того рождались люди,
Чтоб мир порос забвения травой?..
Уже Четвёртой Мировой не будет —
Лишь не было бы Третьей Мировой!

Ni vivduonon perdas pro l' hastemo,
Ne rimarkante foje pro l' hastad'
Rusulkapeton kun pluvduta tremo,
Doloron en vizaĝ de la amat'.

Kaj nur dum via vivsubira fate,
En brilo de l' sukceso en l' anim',
Vin kaptos je la gorĝo senkompatate
Glaciaj manoj – krifoj de l' ektim'.

Ĉasante dum la viv' ĥimeron sekan,
En zorgoj-foroj, urĝaj ĉiam pli,
Ĉu vi rimarkis ion vere pravan,
Ĉu ĝuste tion preterpasis vi?..

Minutoj

Nur je unu minuto – ĉu gravas? –
Plilongigis la tag' ekde nun.
Kio do? Tamen ial nin ravas
En l' animo pli multe da sun' /

Jes, la vintro plu fortas neĝbrile,
Frugilegoj plu estas en for'.
Sed minutoj sen ĉes gutsimile
Ronĝos neĝon de horo al hor'.

Frugilegoj ekvojos tumultre,
Roj' ekvojos en bruofensiv'...
Ho minut'! Kaj malmulte, kaj multe:
El minutoj Konsistas la viv'.

Ĉu homoj venis al la mondo kara
Por ĝia fal' el la memor' sen spur'?..
Ne estos mondmilito jam la kvara –
La tria mondmilit' ne estu nur!

Esperantigis Klara Ilutoviĉ

Tradukita prozo

Esperanto

El kolekto de Kolimaj rakontoj “Maldekstra bordo”

Varlam Ŝalamov

Vagabonda aktoro, aktoro-prizonulo, rememorigis al mi tiun historion. Post koncerto de koncentreja arta teamo la ĉefa aktoro, kiu estis ankaŭ reĝisoro kaj teatra ĉarpentisto, menciis familinomon Skorosejev.

Mia cerbo estis bruligita, kaj mi rememoris la etapon en la trideknaŭa jaro, la kontraŭtifan kvarantenon kaj nian kvinopon, eltenintan, elsuferintan ĉiujn-ĉiujn sendadojn, ĉiujn etapojn, ĉiujn staradojn en frostoj, tamen kaptitan de la koncentreja reto kaj eljetitan en la senlimon de la tajgo.

Ni kvin ne eksciis, ne sciis kaj ne volis ion scii unu pri la alia, ĝis kiam nia paŝado atingis la lokon, kie ni devis labori kaj loĝi. Ni renkontis la novaĵojn pri la etapo diverse. Unu el ni frenezigiĝis, pensante, ke oni kondukas lin al pafekzekuto, kvankam oni kondukis lin al vivo. Alia ruzis kaj preskaŭ superruzis la sorton. La tria – mi! – estis homo la orminejo, indifera skeleto. La kvara estis ĉioscipova majstro, pli ol sepdekjara. La kvina estis – “Skorosejev, – diradis li, leviĝante sur la piedpintoj por rigardi en la okulojn de ĉiu. – Mi rapide semas¹... Ĉu vi komprenas?”

Por mi estis tute egale, kaj de kalemuroj mi estis dekutimigita por ĉiam. Sed la ĉioscipova majstro subtenis la interparolon:

– Kio estis via profesio?

– Agronomo en Narkomzem.²

La ĉefo de la karbominada esploro, akceptanta la etapon, foliumis la dosieron de Skorosejev.

– Civitano ĉefo, mi povas ankaŭ...

– Mi komisios al vi gardadon...

Skorosejev laboris en la esploro kiel gardisto fervore. Li neniam forlasis la postenon eĉ por minuto. Li timis, ke ajnan fuŝon misuzos kunulo: denuncos, perfidos, atentigos la estron. Pli bonas ne riski.

Foje tutan nokton estis densa blizardo. Alternulo de Skorosejev estis galiĉano Narinskij, blonda militkaptito de la unua mondmilito, kondamnita pro preparado de ribelo por restaŭri Aŭstro-Hungarion kaj iomete fieranta pro tia senprecedenca, rara



¹La familinomo “Skorosejev” estas formita el la rusaj vortoj “skoro” (rapide) kaj “sejati” (semi). – *Rim. de la tradukinto.*

²Narkomzem (ruse: Narodnij komissariat zemledelija – Popola komisararo de agrikulturo) estis ŝtata organo en USSR en 1929 – 1946, egalranga al ministerio. Ĝi okupiĝis pri la planado kaj administrado de la agrikultura produktado. – *Rim. de la tradukinto.*

kulpo inter amasegoj da “trockiistoj” kaj “sabotantoj”. Narinskij, ŝanĝante Skorosejev por vica deĵorado, ridante atestis, ke Skorosejev eĉ dum la neĝado, dum la blizardo ne forlasis sian postenon. La fideleco estis rimarkita. La pozicio de Skorosejev plifirmiĝis.

En la koncentrejo mortis ĉevalo. Tio estis ne tre granda perdo: en la Fora Nordo ĉevaloj laboras malbone. Sed la viando! Viando! La kadavron necesis senfeliĝi, sed ĝi frostiĝis en la neĝo. Majstroj kaj dezirantoj ne troviĝis. Volontulis Skorosejev. La estro ekmiris kaj ekĝojis: felo kaj viando! La felon por raporto, la viandon – en la kuirujon. Pri Skorosejev paroladis la tuta barako, la tuta loĝloko. Viando, viando! La ĉevalkadavron oni trenis en la banejon, kaj Skorosejev malfrostigis la kadavron, senfeliĝis ĝin, sentripigis. La felo malmoliĝis pro la frostoj kaj estis transportita en la tenejon. Manĝi la viandon al ni ne bonŝancis. Lastmomente la ĉefo ŝanĝis sian decidon: ja ne estis veterinaro, subskribo sur la akto ne estis! La ĉevalkadavron oni dishakis je pecoj, kompilis akton kaj bruligis en lignofajro en la ĉeesto de la ĉefo kaj la laborestro.

Karbon, kiun serĉadis niaj minadesploristoj, oni daŭre ne sukcesis trovi. Iom post iom – kvinope, dekope – oni komencis foriradi el la koncentrejo por etapo. Supren laŭ monto, laŭ tajga pado foriradis tiuj homoj el mia vivo por ĉiam.

Kie ni loĝis, estis tamen minadesploro, ne orminejo, kaj ĉiu tion komprenis. Ĉiu strebis resti tie laŭeble plej longe. Ĉiu “bremsis” kiel povis. Unu komencis labori nekutime diligente. Alia – preĝi pli longe ol kutime. Angoro eniris nian vivon.

Venis eskorto. El trans la montoj venis eskorto. Ĉu por la homoj? Ne, la eskorto forkondukis neniun, neniun!

Nokte oni priserĉis la barakon. Ni ne havis librojn, ne havis tranĉilojn, ne havis kemiajn kraĵojn, ĵurnalojn, paperon – do kion serĉi?

Oni konfiskadis liberulajn vestaĵojn, liberulajn vestaĵojn – multaj liberulajn vestaĵojn havis – ja en tiu minadesploro laboris ankaŭ liberdungitoj, kaj la esploro estis seneskorta. Ĉu preventado de fuĝoj? Ĉu plenumado de ordono? Ĉu ŝanĝo de la reĝimo?

Ĉion oni konfiskadis sen ajnaj protokoloj, sen notoj. Konfiskadis – kaj fino! La indigno estis senfina. Mi rememoris, kiel antaŭ du jaroj en Magadano oni forprenadis liberulajn vestaĵojn de centoj da paŝtranklokiĝoj, de milcentoj da homoj. Mildekojn da peltoj, kiujn kunprenis en la Nordon, en la Foran Nordon kompatindaj kondamnitoj, da varmaj paltoj, sveteroj, multekostaj kostumoj – multekostaj, por iam doni koruptaĵon – savi sian vivon en decida horo. Tamen la vojo al saviĝo estis fermita en la magadana banejo. Amasegoj da liberulaj vestaĵoj estis metitaj en la korto de la magadana banejo. La amasegoj estis pli altaj ol la akvoproviza turo, ol la baneja tegmento. Amasegoj da varmaj vestaĵoj, amasegoj da tragedioj, amasegoj da homaj sortoj, kiujn oni ĉesigadis neatendite kaj abrupte – ĉiujn elirantajn el la banejo kondamnante al morto. Ah, kiel luktis ĉiuj ĉi homoj por savi sian havaĵon kontraŭ krimuloj, kontraŭ malkaŝa rabado en barakoj, vagonoj, transsendaj koncentrejoj. Ĉion, kio estis savita, kaŝita kontraŭ krimuloj, – forprenis la ŝtato en la banejo. Kiel simple! Tio estis antaŭ du jaroj. Kaj jen – denove.

Liberulajn vestaĵojn, kiuj penetris en la orminejon, oni konfiskadis poste. Mi rememoris, kiel oni vekis min nokte. En la barako priserĉadoj okazis ĉiutage – ĉiutage oni forkondukis homojn. Mi sidis sur la tabullito kaj fumis. Nova priserĉado – por liberulaj vestaĵoj. Mi ne havis liberulajn vestaĵojn – ĉio estis lasita en la magadana banejo. Sed miaj kunuloj liberulajn vestaĵojn havis. Tio estis altvaloraj

aĵoj – simbolo de alia vivo, putrintaj, ŝiritaj, neflikitaj – por flikado sufiĉis nek tempo, nek fortoj, – tamen karaj.

Ĉiuj staris ĉe siaj lokoj kaj atendis. La juĝenetisto sidis apud lampo kaj skribis akton, akton de priserĉado, konfisko – tiel tio nomiĝas en la koncentreja lingvo.

Mi sidis sur la tabulito kaj fumis sen malkvietiĝi, sen indigni. Kun sola deziro, ke la priserĉado finiĝu laŭeble plej baldaŭ, kaj ni povu dormi. Sed mi vidis, kiel nia deĵoranto nomata Prago hakadis per toporo sian propran kostumon, disŝiris la litutukojn, senkompute tranĉis la ŝuojn.

– Nur por piedĉifonoj. Nur kiel piedĉifonojn mi fordonos tion.

– Forprenu de li la toporon! – kriis la juĝenetisto. Prago ĵetis la toporon surplanken. La priserĉado haltis. La aĵoj, kiujn ŝiris, tranĉis kaj neniigis Prago, estis liaj aĵoj, lia propraĵo. Tiujn aĵojn oni ankoraŭ ne sukcesis registri en la akto. Prago, vidante, ke oni ne kaptas lin je la manoj, ĉifonigis siajn liberulajn vestaĵojn antaŭ miaj okuloj. Kaj antaŭ la okuloj de la juĝenetisto.

Tio estis antaŭ jaro. Kaj jen – denove.

Ĉiuj estis ekscititaj, longe ne ekdormis.

– Inter la krimuloj, kiuj prirabas nin, kaj la ŝtato por ni estas nenia diferenco, – diris mi. Kaj ĉiuj konsentis kun mi.

Gardisto Skorosejev foriradis por sia deĵoralterno du horojn pli frue ol ni. Kolone po du – kiel ebligis la tajga pado – ni atingis la kontoron koleraĵ, ofenditaj – la naiva sento de justeco vivas en homoj tre profunde kaj eble estas neelradikigebla. Oni povus pensi: kial ofendiĝi? Koleri? Indigni? Tio ja estas mila okazo – tiu damna priserĉado. En la animprofundo bolegis io pli forta ol la volo, pli forta ol la vivosperto. La vizaĝoj de la arestitoj estis malhelaj pro la kolerego.

Sur la perono de la kontoro staris la ĉefo mem, Viktor Nikolajeviĉ Plutalov. Ankaŭ la vizaĝo de la ĉefo estis malhela pro la kolerego. Nia eta kolono haltis apud la kontoro, kaj oni tuj vokis min en la kabineton de Plutalov.

– Do vi diras, – Plutalov rigardis min el sub la streĉitaj brovoj, mordetante la lipojn, pene, malkomforte eksidante sur tabureto ĉe la skribotablo, – ke la ŝtato pli malbonas ol la krimuloj?

Mi silentis. Skorosejev! Senpacienca homo, sinjoro Plutalov ne maskis sian denuncanton, ne atendis du horojn! Aŭ ĉu temas pri io alia?

– Viaj interparoloj ne estas mia afero. Sed se oni denuncas al mi aŭ... kiel oni diras en via lingvo? Ĉu “blovas”?

– Blovas, civitano ĉefo.

– Aŭ ĉu eble “frapas”?

– Frapas, civitano ĉefo.

– Iru labori. Vi ja mem pretas forvori unu la alian. Politikistoj! Tutmonda lingvo. Ĉiuj komprenas unu la alian. Mi ja estas la ĉefo – mi devas ion fari, kiam oni blovas al mi...

Plutalov kraĉis furioze.

Pasis semajno, kaj kun vica etapo mi forveturis el la minadesplorojo, el la benita minadesplorojo, al granda minejo, kie jam en la unua tago mi ekstaris anstataŭ ĉevalo ĉe egipta vinĉ-cilindro, puŝegante per la brusto trabon.

Skorosejev restis en la minadesplorojo.

Estis koncerto de koncentrejaj amatoraj artistoj, kaj migra aktoro-koncertgvidanto, anoncinte programeron, elkuradis en la artistejon – unu el

malsanulejaj ĉambroj – por plibonigi la humoron de malspertaj koncertantoj. "La koncerto pasas bone! Bone pasas la koncerto", – flustradis li en la orelon de ĉiu partoprenanto. "Bone pasas la koncerto!" – anoncadis li laŭtvoĉe kaj paŝadis tra la artejstejo, viŝadis per iu malpura ĉifono ŝviton de sur sia varmega frunto.

Ĉio estis kiel ĉe oficialaj aktoroj, kaj la migra aktoro mem estis en la libero granda aktoro. Iu per tre konata voĉo legis sur la podio la rakonton de Zoŝĉenko "Limonado". La anoncisto kliniĝis al mi:

– Donu cigaredon.

– Fumu.

– Vi ne kredos, – subite diris la anoncisto, – se mi ne scius, kiu voĉlegas, mi pensus, ke estas tiu putinido Skorosejev.

– Ĉu Skorosejev? – Mi komprenis, kies intonaciojn memorigis al mi la voĉo de sur la scenejo.

– Jes. Mi ja estas esperantisto. Ĉu vi komprenas? Tutmonda lingvo. Ne ia "basic English". Kaj kondamnita pro Esperanto. Mi estas membro de la moskva esperantista societo.

– Ĉu laŭ la kvindekoka-ses? Ĉu pro spionado?

– Memkompreneble.

– Ĉu dek?

– Dek kvin.

– Kaj Skorosejev?

– Skorosejev estis vicprezidanto de la societa estraro. Ĝuste li ĉiujn perfidis, kaŭzis la akuzojn por ĉiuj...

– Ĉu tiom malalta?

– Jes ja.

– Sed kie li estas nun?

– Mi ne scias. Mi strangolus lin propramane. Mi petas vin kiel amikon, – mi kaj la aktoro konis unu la alian du horojn, ne pli, – se vi vidos lin, se renkontos, tuj batu la muzelon. Batu, kaj duono de viaj pekaj estos pardonita.

– Ĉu vere duono?

– Pardonita, pardonita.

Sed la voĉleginto de la rakonto de Zoŝĉenko "Limonado" jam estis foriranta de sur la scenejo. Tiu estis ne Skorosejev, sed maldika, alta kiel la Romanov-devena grandprinco, barono, barono Mandel – posteulo de Puŝkin. Mi seniluziiĝis, fiksrigardante la posteulon de Puŝkin, kaj la anoncisto jam elkondukis sur la scenejon sekvan viktimon. "Super griza marebena vento nubojn kumpeladas..."

– Aŭskultu, – flustris la barono, klininte sin al mi, – ĉu tio estas versaĵo? "Vento blovas, tondro tontras"? Versaĵoj estas ne tiaj. Estas terure pensi, ke tio estis verkita samjare, samtage kaj samhore, kiam Blok verkis "Ekzorcon per fajro kaj tenebro", kaj Belij "Oron en lazuro"...

Mi enviis al la feliĉo de la barono – distriĝi, fuĝi, kaŝiĝi en versaĵojn. Mi tion fari ne kapablis.

Nenio estis forgesita. Kaj pasis multaj jaroj. Mi venis en Magadanon post mia



liberigo, strebante vere liberiĝi, transnaĝi tiun teruran maron, sur kiu antaŭ dudek jaroj oni transportis min al Kolimo. Kaj kvankam mi sciis, kiom malfacile estos vivi en mia senfina vagado, – mi ne deziris eĉ horon resti propravole sur la malbenita kolima tero.



Mi havis minimumon da mono. Samdirekta aŭto – rublon por kilometro – venigis min vespere en Magadanon. Blanka mallumo vualis la urbon. Mi havas konatojn ĉi tie. Mi certas. Tamen konatojn en la Kolima regiono oni serĉas tage, sed ne nokte. Nokte neniu malfermos la pordon, eĉ aŭdante konatan voĉon. Mi bezonas tegmenton, tabulliton, dormon.

Mi staris en la busa stacidomo kaj rigardis la plankon, plene kovritan de korpoj, aĵoj, sakoj, kestoj. Ekstremokaze... La malvarmo ĉi tie estis kiel ekstere, ĉirkaŭ kvindek gradoj. La fera forno ne estis hejtata, kaj la pordo senĉese frapadis.

– Ŝajne konato?

Mi ekĝojis eĉ al Skorosejev en tiu terura frostego. Ni manpremis unu la alian tra la pugnogantoj.

– Venu noktumi al mi, mi ĉi tie havas propran domon. Mi ja delonge liberiĝis. Konstruis kredite. Eĉ edziĝis. – Skorosejev ekridegis. – Ni trinkos teon...

Kaj tiom malvarme estis, ke mi konsentis. Ni longe rampis laŭ la montoj kaj kavoj de la nokta Magadano, tegita de malvarma opake blanka mallumo.

– Jes, mi konstruis domon, – parolis Skorosejev, dum mi fumis ripozante, – kredito. Ŝtata kredito. Mi decidis fari neston. Nordan neston.

Mi sattrinkis teon. Kuŝiĝis kaj ekdormis. Sed dormis mi malbone malgraŭ malproksima mia vojo. Pro io estis malbone travivita la hieraŭa tago.

Kiam mi vekigis, lavis min kaj ekfumis, mi komprenis – kial mi travivis la hieraŭan tagon malbone.

– Nu, mi iru. Ĉi tie loĝas mia konato.

– Vi lasu la valizon. Vi trovos la konatojn – kaj revenos.

– Ne, ne indas duan fojon grimpi sur la monton.

– Vi povus loĝi ĉe mi. Ni ja estas delongaj amikoj.

– Jes, – diris mi. – Adiaŭ. – Mi butonis la peltjakon, prenis la valizon kaj jam prenis la anson de la pordo. – Adiaŭ.

– Sed la monon? – diris Skorosejev.

– Kian monon?

– Ja por la lito, por la tranokto. Tio ja ne estas senpaga.

– Pardonu min, – diris mi. – Mi ne pensis pri tio. – Mi metis la valizon, malbutonis la peltjakon, palpe trovis en la poŝoj monon, pagis kaj eliris en la blanke flavan tagan mallumon.

1965

*Tradukis Mikaelo Povorin
Redaktis Viktoro Aroloviĉ*

Tradukita poezio

Девушка с оленьими глазами

Слова и музыка народные (на ту же мелодию поётся ещё ряд песен)

Где-то за Курильскою грядой,
Там, где ветры спорят с парусами,
Повстречал рыбак на берегу
Девушку с оленьими глазами.

Ничего рыбак о ней не знал,
Он шаланды в море вел, тоскуя.
Никогда еще морской причал
Не встречал красавицу такую.

– Будь, красавица, моей женой,
Вот шаланда — значит, счастье с нами,
Будь моей русалкой дорогой,
По морям искал тебя годами.

Подняла красавица глаза,
По его щеке веда рукою.
И рыбак не думал, не гадал:
Девушка была совсем слепую.

Где-то за Курильскою грядой
Пару вы могли встречать такую:
Шел рыбак, высокий и седой,
За руку подругу вел слепую.

Dua duono de 1960-aj jaroj

Junulin' kun cerva okulparo

Popola kanto

(La sama melodio estas uzata por kelkaj aliaj proksimume samtempaj popolkantoj: "Oriolo", "Delfenido", "Knabino kun malplektitaj haroj")

Ie post Kurila insular'
Luktas vel' kun vent' sur onda aro
Renkontiĝis kun fiŝist' ĉe mar'
Junulin' kun cerva okulparo.

Li pri ŝi nenion sciis, kaj
Navigadis ofte sen agordo.
Sed ĝis nun ne vidis mara kaj'
Belulinon tian sur marbordo.

"Edziniĝu al mi, petas Vin,
Sub feliĉa vel' ni ĉiam drivos.
Estu mia kara marfein',
Mi serĉadis Vin, ni kune vivos."

Levis la palpebrojn l' junulin'
Kaj permane palpis liajn vangojn.
Li ekvidis, ke ŝi - blindulin',
Tamen al la Sort' esprimis dankojn.

Ie post Kurila insular'
De l' fidela am' vi vidos finon:
La grizhara fiŝkaptist' en par'
Akompanas blindan amikinon.



Позабыт-позаброшен

Слова и музыка народные

Как на дальней стороне
громко пел соловей.
А я мальчик на чужбине
далеко от людей.

Позабыт, позаброшен
с молодых юных лет
Я остался сиротой,
счастья доли мне нет.

Вот и холод и голод,
он меня изморил.
А я мальчик еще молод
это все пережил.

Ох умру я, умру я,
похоронят меня.
И никто не узнает,
где могилка моя.

И никто не узнает,
и никто не придет.
Только раннею весною
соловей пропоет.

Пропоет и просвищит,
и опять улетит.
А моя скромна могилка
одинокое стоит.

Komenco de la 20-a jc.

Forgesita de ĉiuj

Popola kanto

Najtingal' en arbusto
kantas sur kampa rand'.
Sed mi knab' sen proksimuloj
solas en fremda land'

Forgesitan de ĉiuj,
batis min sorta pun'.
Mi orfiĝis en juneco,
min forlasis fortun'.

Pro malsat' kaj malvarmo
mi seniĝis je fort'.
Sed mi juna knab' eltenis
ĉiujn batojn de sort'.

Jen mi mortos, mi kuŝos
sub tre eta tumult'.
Kaj neniu tiam scios
kie mortis povrul'.

Kaj neniu vizitos,
min kuŝantan sub ter'.
Nur kanteto najtingala
sonos en primaver'.

Trile kantos kaj poste
flugos for najtingal'.
Nur tombeto mia povra,
sola restos en val'.

Tradukis Gennadij Ŝlepĉenko



La hundaj songoj

Aleksej Nistratov



Kiom mi memoras min, mi ŝatis dormi. Por kapti la bonan songon, kvazaŭ rapidan leporon, endas esti bona ĉasisto – necesas fermi okulojn, kuŝi kaj pacience atendi. Kaj kiam ĝi ekglitos, eksekvi ĝin kure, fiksi kaj neniukaze lasi ĝin. Tiam morgaŭ oni vekigās sata da impresoj kaj kontenta. Sed dum nokta ĉasado mi ne bonŝancis – bonaj songoj aperis malofte. Verŝajne, pro tio, ke mi estas nigra-blanka kaj videblas en mallumo?

Unuaj miaj songoj estis agrablaj, sed diskretaj. Mi memoras varman ventron de panjo, bongustan lakton en la buŝo, felajn korpetojn ambaŭflanke. Tamen ial ĉirkaŭe estis mallume.

Iom poste mi malfermis la okulojn kaj ekvidis grandan nigra-blankan hundon, kiu nutris min, kaj samkolorajn bulojn apude. Ni kuŝis en blanka ĉambro sur io mola, ĉirkaŭ ni aliaj hundoj loĝis. Min interesis observi ilin, mi povis pasigi tiel la tutan tagon.

Poste mi subite komprenis, ke per kruroj eblas iri aŭ eĉ kuri, per dentoj eblas maĉi ion ajn, kaj per vosto eblas svingi. Mi kun miaj gefratoj senĉese ludis «interĉason», la humoro estis tre ĝaja. Domaĝas nur, ke krado ne permesis al ni penetri eksteren.

Foje en la ĉambro aperis dugamba giganto kaj alportis ion en bovloj. Mi gustumis tiun aroman mason, kaj ĝi plaĉis al mi pli ol la panja lakto. Tiam mi komprenis, kiucele la homoj estas bezonataj. Mi ĉiam manĝis volonte kaj rapide kreskis.

Unufoje ĉio ŝanĝiĝis. Virino, kiu portis al ni nutraĵon, alkrōcis al mi iujn ŝnurojn kaj tiris min eksteren, kaj poste fermis min en baritan kaĝon. Tie jam loĝis du rufaj inoj pli aĝaj ol mi, kaj apude en similaj kaĝoj – multo da hundoj. Kial ŝi disigis min de miaj panjo kaj gefratoj? Mi ege ploris pro senkaŭza ofendo.

Miaj kunloĝantoj estis bonkoraj kaj amikiĝis kun mi, sed la vivo en korto estis malbona. Tie estis malhele kaj malvarme, anstataŭ ŝatataj konservaĵoj oni donis al ni sekan sengustan nutraĵon. Nur unufoje ĉiusemajne oni eligis nin por kurta promeno en barita placeto. Vivo iĝis vico de grizaj tagoj, ankaŭ songoj nokte ne venis.

La turno okazis denove neatendite, kiam ridetema virino eniris en mian kaĝon, donis bongustan peceton, mankaesis min kaj poste ial tiris min el la loĝejo. Dekomence mi rezistis, sed ŝi karesvoĉe ripetadis nomon Elis, kaj mi finfine kredis al ŝi. Ni eksidis sur molan divanon apud fenestro, io ekbruis, ĝi ekskuis, kaj trans fenestro ĉio ekkalejdoskopis. Mi sentis vomon, sed la bonkora virino tuttempe trankviligis min. Bonokaze, ni baldaŭ alveturis, kaj ŝi venigis min en lumigitan ejon kun amaso da novaromaj kaj novaspektaj aĵoj. Mi ekflaris manĝaĵon kaj akvon, sed post veturo la kapo turniĝis, mi ekuŝis sur tapiŝon en angulo kaj ekdormis. Tiam la terura songo porlonge kaptis min.

Kiam venis vespero, mi sate manĝis, kaj mastrino venigis min por promeno. Mi emocie flaris ĉion en la korto, konatiĝis kun socio de lokaj hundoj. Mi nervumis, esplorante novan loĝlokon, tamen la mastrino flatis kaj kuraĝigis min. Kaj subite malantaŭ mi tondris timiga bruo...


Teruro ekposedis min, kaj mi ĵetis min for, ne elektante vojon. Mi ekkuris al heloranĝa lumo kaj subite aperis inter rapide akcelantaj grincantaj feraĵoj. Ŝajne, la mastrino vokis min, sed pro timo mi nenion komprenis, nur kuris laŭ la ŝoseo, savante min de aŭtoj. Kiam ilia fluo por momento ĉesis, mi plonĝis en mallaman korton kaj longe reordigis spiradon.

Mi trafis en nekonatan lokon preskaŭ senhoman kaj senhundan. Mi memoris odoron de la mastrino kaj komencis serĉi ŝin, sed trovis neniun similan. Maloftaj preterirantoj ne atentis min, sed unu ekkriis kaj ĵetis bastonon kontraŭ min. Pro kio?

La tutan vesperon mi vagis kaj serĉis la mastrinon. Ve, sensukcese. Kelkfoje aŭtoj preterveturis min, odoro de unu ŝajnis al mi konata, sed nun mi timis ilin kaj kaŝiĝis post arboj. Fine mi lacis, ekkuŝis kaj ekdormis en foliaro, esperante, ke matene la terura sonĝo pasos.

Malsato vekis min, ĝi igis min leviĝi kaj komenci serĉadon de manĝaĵo. Fabelaj aromoj fluis el kelkaj fenestroj, sed la pordoj estis fermitaj. Kaj malsato pelis min plu, movante mian nazon. Fine mi trovis sakon kun nutraĵo apud verdaj kestoj, sed ĝi ial estis miksitaj kun rubaĵoj. Krianta homo kun balailo eĉ ne permesis al mi finmanĝi restaĵojn – mi estis devigita fuĝi.

Sopirante pri mia mastrino, mi daŭrigis la serĉadon. Mi ne memorfiksas nian domon kaj korton – ili ĉiuj aspektis same. Kaj mi nenie malkovris konatan odoron. Homoj denove hastis pri siaj aferoj, ne rimarkante min. Nur foje iu duopo ekrigardis min kaj ekmansvingis, sed mi forkuris, havanta malbonan sperton.



Eĉ lokaj hundoj ne povis helpi min: ja mi estis novulo en ilia distrikto. Almenaŭ ili montris al mi aliajn kestojn, kie oni povus trovi iom da manĝaĵo. Tiel pasis mia unua tago sen la mastrino.

Mi ege esperis, ke la sekvan tagon la koŝmaro disiĝos, sed matene ĉio ripetiĝis. Nur malsato kaj malvarmo pliiĝis. Ĉifoje manĝaĵo malaperis, do fortoj por serĉado malpliiĝis. Vespere mi

volis nur varmiĝi kaj dormi.

Tagoj pasis post tagoj, kaj mi daŭre loĝis surstrate. Mi ne havis lokon por veni, neniu vokis min. Eĉ miaj hundoj-amikoj ne povis helpi, ili mem fartis malbone. Ni savis nin de nokta malvarmo, kuŝante sub varma tubo fore de domoj.

Tiun tagon mi fine perdis la esperon pri la bono. Mi iraĉis laŭ iu starto, apenaŭ trenante krurojn, senemocia pri ĉio. Mi komprenis, ke tiu sonĝo neniam finiĝos.

Subite antaŭe mi haltis aŭto, el ĝi eliris virino kaj komencis voki min laŭ la nomo, etendante la manojn. Strangas, kial mi konas ŝian voĉon kaj odoron? Sed mi malkutimis kredi al homoj kaj ekretiris. Ŝi postsekvis min. Nu ne, mi ne permesos kapti min!

Mi haltis, kiam mi stumblis je barilo. Dum mi pensis, kien fuĝi plu, viro el la aŭto direktis al mi bastonon, kaj io bekis min je flanko. Mi ekturmiĝis surloke kaj baldaŭ falis en profundan dormon...

Tuj denove estos malsate, malvarme kaj malplene en animo. Ho ne! Mi malfermis la okulojn, kuŝante en varma ĉambro, antaŭ mi staris plena bovlo. Kaj apud mi sidis kaj ploris tiu, kiun mi dum la tuta tempo serĉis. Ŝi senĉese ripetis mian nomon kaj ankoraŭ pliajn karesvortojn. Kaj kiam ŝi tuŝetis min, la fia senĉesa sonĝo malaperis senspurre. Mia reala feliĉa vivo komenciĝis!

Vi povas trovi vian plej bonan amikon en Kojuhovskij urba azilo por senhejmaj bestoj!

Vidu <http://vao-priut.org>

Skribu: alvinist@yandex.ru

Kanto

La timo de poet'

Ideo: Mark Melamed ("O vrede gramotnosti")

– Так много пишешь ты стихов
Про бегемотов, кабанов,
Волков, гиен, гадюк, слонов...
О людях – не найдёшь двух слов.
Скажи, поэт, в чём дело тут?
– Боюсь, прочтут... и загрызут.

***Libera esperantigo kaj muziko:
Mikaelo Povorin***

Mi foje parolis kun fama poet'.
Vi liajn poemojn ja konas.
Li pretas rakonti pri sia sekret',
Volonte respondojn li donas.
Jen homo treege agrabla:
Saĝega, spritega, afabla!

Mi diris al li: "Ĉiu via poem'
Pri bestoj diversaj rakontas.
Vi ilin priskribas kun gaja ŝercem',
Malkaŝi la veron ne hontas.
Pri via sagaco unika
Cirkulas legendo publika.

Legante pri stulta simi'-sentaŭgul',
Mi ridon ne povas reteni.
Ja ĝia talento egalas al nul',
Nenion ĝi povas kompreni.
Pri tiu bestaĉ' senkapabla
Brilegas kritik' via fabla.

Vi ege sarkasme pri granda leon'
 Ezopas laŭ ritmo kaj rimo,
 Kaj ĉiu komprenas, pro kia rezon'
 Ĝin bestoj evitas kun timo.
 Pri tiu despot' hipokrita
 De vi estas multo dirita.

Jen aglo fiera, sidanta sur rok'.
 Ĝi sin opinias car-birdo.
 La aglon vi karikaturas kun mok',
 Kaj ĉiujn ridigas la bildo.
 Pri ĝia orgojla konduto
 Delonge ne indas diskuto.

Vi sprite pri ĉiu nuanco de l' viv'
 De bestoj sovaĝaj poetas.
 Infan' kaj oldulo pro via edif'
 Respekte la ĉapon demetas.
 Pri homoj vi verkas nenion.
 Sed kial? Ne havas mi scion."

Respondis al mi la poet' kun suspir':
 "Mi estas ja homo singarda!
 Mi tute ne volas fariĝi martir'
 De homa reago tro arda!
 Mi timas danĝerajn eventojn:
 La homajn ungegojn kaj dentojn!"

La verkado de la teksto komencita: 23.03.2017

Finita: 09.07.2018, Neburĉilovskaja daĉa, en la lasta tago de RET-2018.

La timo de poet'

Ideo de Mark Melamed Libera esperantigo kaj muziko de Mikaelo Povorin

Vigle D F#m G A7 D F#m G A7 D C#7

F#7 Hm A7 D Em

C#7 F#7 Am H7

C B A7 D F#m G A7

Kultura projekto

Rusaj popolaj kantoj de la 20-a jarcento

Karaj amikoj!

Mi proponas projekton pri esperantigo de rusaj popolaj kantoj de la 20-a jc. Temas pri kantoj, kiujn oni konstante kantis en diversaj societoj – dum hejmaj festoj, en la kortoj, ĉe lignofajroj dum turismaj marŝoj, en studentaj komunloĝejoj ktp., ktp. Tio estas granda tavolo de la nacia kulturo. En 1990-aj-2000-aj jaroj tion rimarkis gravaj kulturagantoj, kiel reĝisoro Mark Rozovskij kun siaj famaj spektakloj “Kantoj de nia korto”, kaj “Kantoj de nia komunloĝejo” en teatro “Ĉe Nikitskij pordego”, kaj Eduard Uspenskij kun Eleonora Filina per sia grandioza projekto de radiaj kaj televidaj elsendoj “Al haveno nia ŝipoj vizitadis”, kaj aliaj; ekzistis eĉ



sciencaj konferencoj koncernaj. Tamen al Esperanto oni tradukis tiajn kantojn nur malofte. Tamen ja tradukas – bonan ekzemplon montras prezentitaj en tiu ĉi kaj antaŭa numeroj tradukoj far G. Ŝlepĉenko. Mi atentigas, ke temas pri la kantoj, kiuj apartenas al *folkloro*, kiuj ne havas difinitajn aŭtorojn, diference de aŭtoraj kantoj de profesiaj poetoj, artistoj ktp. (bardaj kantoj). Kompreneble, la limo ne ĉiam tute striktas, ĉar surbaze de ies aŭtora teksto aŭ/kaj melodio, trafinta en la popolamasojn, naskiĝis kanto popola, evoluanta laŭ folkloraj reguloj – kun forlaso aŭ ŝanĝo de certaj vortoj kaj versoj, sed samtempe kun aldono de novaj strofoj ktp., havante diversajn variantojn... Se tia kanto jam fariĝis pli folkloro ol aŭtora, ĝi taŭgas por la prezentata projekto, se ĝi restas nur ioma adapto de la aŭtora teksto – ne. La suba tempolimo por tiuj kantoj estu la jaro 1917.

Mi turnas min al niaj aktivaj poeziemaj kaj tradukemaj majstroj, kaj ankaŭ al tiuj, kiuj nur provas siajn fortojn en la tradukkampoj. La (bonaj) tradukoj laŭeble aperados en “Cerbe kaj kore”. Se ni akumulos sufiĉan kvanton da tiaspecaj tradukoj el diversaj ĝenroj, eblus pensi pri eldono de aparta libr(et)o.

Dume, por la komenco, mi petas sendi al mi proponojn pri la listoj de tiuj 20-jarcentaj folklorajoj, kiuj estas la plej popularaj kaj tial nepre tradukendas.

Nikolao Gudskov

CERBE kaj KORE

n-ro 6 (74), februaro 2019

Kultura suplemento al Bulteno de REU (BdR) n-ro 101

**BdR estas oficiala informilo de la tutrusia socia organizaĵo
“RUSIA ESPERANTISTA UNIO”**

***Oni rajtas uzi kaj represi ĉiujn materialojn de la eldono nur kondiĉe
de ĝusta indiko de la fonto***

**CkK atendas viajn prozajn, poeziajn, interlingvistikajn, instru-
metodikajn kaj scienc-popularajn kontribuojn! Bonvolu sendi
ilin al Nikolao Gudskov nikolao@yandex.ru .**

Estraro de Rusia Esperantista Unio

Redaktotino 09.02.2019